**N I A   V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **APRILO 2009**

# NI ATENDAS VIN EN LA MADRIDA FORUMO FINE DE APRILO

## EN HISPANIO

Dum la programo “No es un día cualquiera” de RNE oni prezentis la libron: "De las checas de Barcelona a la Alemania nazi" de **Otilia Castellvi**. Ed. El Acantilado. Ŝi kaj ŝia edzo **Linus Paulinus** estis fervoraj esperantistoj. Otilia estis malliberigita en Barcelono kaj poste ŝi estis en koncentrakampadejo en Francio el kie elmigris al Germanio kaj Venezuelo.

Lluís Batlle komentas la **Iberian Renkontiĝon** okazinta en Oporto: “Al mi plaĉis la renkontiĝo. Mi laŭdas Roger kaj Xana pro la organizo, kiu mirigis per simpleco. Laŭ mi ili kuraĝigis organizi renkontiĝojn. Tie rendevuis ĉefe veteranoj, kun ĝenerale tre bona rego de esperanto, kaj kun apenaŭ "krokodiladoj". Venis almenaŭ paro da novuloj, unu albacetano sufice bone parolanta, kiuj esperebla ĝuis la etoson”.

**Andaluzio** agadas: junaj esperantistoj prelegis antaŭ la lernantaro de Gimnazioj en Estepona kaj Vélez-Málaga; John Gobourne, brita esperantisto, estis akceptita de la Direktorino pri angla lingvo en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj, al kiu li donacis la verkon "La Sonetoj / The Sonest" kaj prelegetis anglalingve antaŭ la studentoj de la 4-a kurso. La 11an de marto profesorino Perla Martinelli prelegos hispalingve ĉe Instituto Andaluz de la Mujer, organizo dependanta de la Junta de Andalucía. La 13an de marto profesoro Giorgio Silfer renkontiĝos ĉe la Asocio de Verkistoj en Malago kaj la 16an de marto Danica kaj Djorge Obradovic, slovena geedza paro, vizitos la centron FNAC por organizi E-ekspozicion (similan al tiu de Punta Umbría).

Toño del Barrio estis intervjuita en "Radio Social Atlántico" de Korunjo (Coruña).

La tekston de la prelego "Naskiĝo de lingvo: de Bialistoko al Bulonjo", farita dum la Kongreso de HEF en Alcalá de Henares, 2005, oni povas legi en:
http://www.telefonica.net/web2/dariorls/prelego.pdf

## ESPERANTA MONDO

Margareta Handzlik , membro de la Eŭropa Parlamento, jam duan fojon ĉijare sendis al Nobel-Komitato rekomendon pri Universala Esperanto-Asocio **(UEA) por la Nobel Premio pri Paco** por la jaro 2009.

**Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto** ekzistas en la Universitato de Amsterdamo jam de 1998 dank' al D-ro Win Jansen. Oni povas legi la lastan bultenon ĉe: http://www.iei.nl/Amsterdama%20Katedro%2009%20jan.pdf

En la februara numero de la prestiĝa literatura revuo “Times Literary Supplement” aperis recenzo de la monumenta verko de Geoffrey Sutton pri la **literaturo de Esperanto** “Concise Enyclopedia of the Original Literature of Esperanto", 740 p. New York: Mondial. ISBN 978 1 59569 090 6. Vidu: http://www.liberafolio.org/2009/anglaenciklopedio

La prezenta **filmo** pri Esperanto en ses pecoj, ellaborita de la grupo E@I, estas konsultebla ĉe http://elesperantoes.blogspot.com/ Ĝi havas subtekstojn en hispana kaj kataluna.

La E-elsendoj de **Radio Vatikana** estas aŭskulteblaj podkaste - aldone al la aliaj "tradiciaj" elsendomanieroj: http://www.radiovaticana.org/it1/on_demand.asp?gr=esp

## VENONTAJ KONGRESOJ

8-a ĝis la 14-a de aprilo. 33-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) Giulianova (Italio) http://iej.esperanto.it/ijf/2009,

Kataluna Esperanto-Asocio kunmemoros la 100-an datrevenon de la UK de Barcelono kun diversaj programeroj, inter ili solena evento en urbodoma Salono "de Cròniques" kun interveno de reprezentanto de la Barcelona urbestro.

23a de aprilo ĝis la 3a de majo: Barcelono. Esperanto-tagoj kaj Printempa Renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Junularo : http://tinyurl.com/62k559

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas **ĉiulunde**, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**3an** de aprilo okazos en la Universitato UNED, Madrid, la 2a preleg-sesio laŭ la sistemo peĉakuĉo: baze ĝi estas prezento-sistemo kie la preleganto rajtas uzi 20 fiksajn bildojn kiuj restas sur ekrano po 20 sekundoj (legu plu prie: http://bitakoro.blogdns.org/scienco/pechakucho/ ). La nombro da prelegontoj en tiu ĉi alvoko estas inter 6 kaj 10. Manolo Pancorbo jam estas konfirmita por paroli pri esperanto je la 12,00h (Sala B, Edificio de Humanidades, calle Senda del Rey, 7).

**13an** de aprilo, je la 19,00h kunbabilado. Gvidas Juan del Castillo

**23an** de aprilo legado de "El Quijote" en Esperanto. Círculo de Bellas Artes

150-a naskiĝdatreveno de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L.Zamenhof

**"ESPERANTO Y ZAMENHOF: DESAFÍO A BABEL"**
**Forumo organizita de Esperanto-Liceo de Madrid**
**25a kaj 26a de aprilo.**

Centro Dotacional Integrado de Arganzuela
c/ Canarias 17. (Metro Palos de Moguer)

**Sabato 25**

10,30 Inaŭguro de esperanta libroservo
11,00 "Zamenhof, gestación del idioma universal" .Juan del Castillo
12,30 "Pioneros del esperanto en España". Toño del Barrio
17,00 "Esperanta poezio". Jorge Camacho
19,00 Koncerto de Koruso "Verda Stelo" en ĝia 25a datreveno.

**Dimanĉo 26**

10,30 "Braille y Zamenhof". Pedro Zurita
12,30 Koncerto de Koruso "Grupo Esperanto"

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid